

## IOM PRI METODOJ PROPAGANDI ESPERANTON

Enkonduke mi devas diri, ke "Aktuale", bedaŭrinde, tute ne okupigas pri tiu temo: kiel propagandi E-on en modernaj kondiĉoj. Pluraj esperantistoj povus komuniki siajn sperton kaj pensojn. Estas vere, ke en la antaŭaj jaroj sur la paĝoj de nia malnova bulteno "Juna Esperantisto" oni sufiĉe skribis pri tiu temo. Tamen ni devus reveni al la temo, ĉar aperis multaj novaj aktivulej, kiuj ne posedas jarkelektojn de "Juna Esperantisto". Krede, tempo pasas, ŝanĝigas ankaŭ la socia vivo kaj opinioj ĉirkaŭ ni. Nur la metodoj, kiujn ni uzas por propagando de Esperanto, restas la samaj.

Propagandi Esperanton (mi pli ŝatus diri: informi pri Esperanto) oni povas per: a) artikolo en leka gazeto; b) radia elpaŝo; c) televida elpaŝo; d) entreprena prezo; e) preletoj; f) murgazetoj.

La valoron de informo pri E-o oni povas mezuri per ĝiaj vasteco kaj profundece. Neniu dubas, ke plej vaste informas leka gazeto (pluraj miloj de legantoj), plej profunde informas preleto. Gazeto povas prezenti ne multan lekon per informo, de la informo estas supraĵa. Preleto prezentas eblecon doni tiom da informo, kiom povas enlekti en du-tri gazetoj, kvarpaĝe dediĉitaj al Esperanto. Perradia preleto eĉ longa ne multe superas la valoron de gazeta artikolo, ĉar la aŭda memoro de la homo estas sufiĉe malpli forta ol la vida. Senpera preleto antaŭ grupo de homoj ĉi-rilate superas la radian, ĉar la aŭskultantoj vidas la preleganton, priesperantajn materialojn (tre grave!), povas fari demandojn. Televida elpaŝo laŭ sia valoro evidente estas inter perradia elpaŝo kaj preleto. Tamen la kvanto da televida informo estas multe malpli granda, ĉar oni limigas la tempon per elpaŝo.

En la 50-60-aj jaroj, kiam la juna kaj meza generaciej nenien scias pri Esperanto, valora (eble) metodo de informado estis leka prezo, radio kaj televido. Tamen homoj, kiuj legis aŭ aŭdis informon pri Esperanto kaj ne eklernis la lingvon (per la tuta lando da tiaj estas efektive milionoj) metis tian tre supraĵan artikolon en la kapon kaj de ĝi post nelonga tempo restis nur: "Esperanto estas internacia artefarita lingvo". Sekve tiu, iuloke sufiĉe amasa, informado pri E-o, ne subtenita per ebleco same amase instrui-lerni la lingvon, respondas al ni per iugrada indifarentiĝo al Esperanto.

Trudiĝas stranga, sed eble filozofia pruvebla konkludo: se ni ne povas prezenti studeblecojn (ĉu lernilojn, ĉu E-kursojn) per ĉiuj, kiuj leginte gazeton volas tuj eklerni la lingvon (pluraj miloj en iu ajna regiono), ĉu ni eble ne uzu gazetojn per informi pri Esperanto? Ja deziro lerni la lingvon ne povas longe atendi, kiam hazarde prezentigos E-lerniloj, E-kurso. La deziro malfortiĝas kun pase de la tempo pro la bolanta ĉirkaŭe vivo, la supraĵa elgazeta informo elvaperiĝas, kaj fine restas nur: "Esperanto estas internacia helpa lingvo". Similaj homoj povas iĝi eĉ niaj potencialaj malhelpantoj. Ili povas alikonvinki deziranton lerni la lingvon, se ĉe la lasta la deziro aperis post gazetelego.

Tute kontraŭe okazas post preleto pri E-o. Unue, dum la preleto estas ebleco bene prilumi E-on de ĉiuj flankoj, mentri objektojn, le-

terojn, librojn, revuojn, bildkartojn, suvenirojn ktp. Due, aŭskultantoj vidas vivan esperantiston, ĉe kiu eblas klarigi ĉiujn dubojn, kiu povas demonstri E-parolon, kiu povas rakonti, kian praktikan utilon li mem ricevis de Esperanto ktp. Ĉio ĉi lasas profundan pozitivan impreson ĉe la aŭskultantoj. Kutime duone aŭ pli eklernas la lingvon (temas pri junulara aŭditorio) tuj post la prelego, se oni organizas E-kurson. La alia duono (aŭ ĉiuj, se forestas lernebleco) restas grandaj simpatiuloj al Esperanto, informas positive pri ĝi al siaj geamikoj.

Prelego pri E-o estas interesa, riĉa arto. Restas nur bedaŭri, ke en SEJM-Konferenco aŭ dum la lastaj SEJT-oj oni ne instruas la arton prelegi pri E-o, ne organizas intersanĝon de sperto ĉi-kampe.

La aŭtoro povas ŝanĝi sian starpunkton pri la rolo de E-materialoj en nia prezo, nur eble tiam, kiam la gazetoj povos presi multajn materialojn pri E-o kaj la movado, minimume ĉiusemajne. (Ĉe la plej multo de regionaj gazetoj oni rifuzas aperigi ofte E-materialojn.) Tiam guto-post-guto la informado firmigos ĉe homoj pozitivan impreson pri E-o kaj ĉiam nutros ĉi impreson. Estus bone aŭdi sur paĝoj de "Aktuale" gesperantistojn el Latvio responde al: ĉu konstanta rubriko pri E-o en "Sovetskaja Melodjoj" plenumas la taskon? La samo el Baŝkirio, kie la informado okazas pli-malpli kontentige. Eventuale en tiuj respublikoj ni devus fari sociologiajn esplorojn ĉi-rilate.

Resume mi velas diri, ke en nunaj kondiĉoj ni ne strebu publikigi artikolojn pri Esperanto en loka prezo, sed prelegu, prelegu kaj prelegu. SEJM devas zorge prepari prelegistojn. Tamen pro la supredirita ne necesas esperi, ke responde al anonco pri prelego venos multaj aŭskultantoj. Pluraj opinias, ke ili jam scias pri la problemo. Plej bonas organizi prelegojn laŭ direkte de la societo "Scio" aŭ en laborejoj kvarondevige tuj post labore. En superaj lernejoj sufiĉas simpla interkonsento kun la komitato de VLKSM aŭ eĉ (pli simple) kun grupestroj.

Mi ne pretendas esti plene prava pri la supredirita, ja la temo estas komplika, kaj kontentes, de la artikolo elvokos diskuton sur la paĝoj de "Aktuale".

A. Gončarov (Barnaul).

#### KIEL SKRIBI ARTIKOLOJN PRI ESPERANTO POR NEESPERANTA GAZETARO

1. Kiam vi prenas kiun ajn ĵurnalon, vi komence rigardas titolojn. Se titolo vin ekinteresis, vi legas la artikolon, se ne - vi ofte entute ne legas. Do, se vi skribas pri E-o, pri tendaro, pri renkontigoj, elektu titolojn, kiuj respegulas la senco de viaj artikoloj kaj samtempe nepre devas ekinteresigi redakcianojn kaj poste legantojn. Do, titolon.

2. Tre gravas la komenco de artikolo: se ĝi ne estas interesa, oni ne legas ĝis la fino. Preferu komenci artikolojn per iu kurioza epizodo aŭ mallonga originala historio, des pli, se temas pri tendaroj: en tendara vivo eblas trovi aron da gajaj kaj interesaj momentoj. Do, komenco.

3. Kiam vi finis vian artikolon, relegu ĝin kaj pensu: se vi ekvidus similan artikolon en iu gazeto, ĉu post tio vi ekinteresiĝus pri Esperanto? Se ne - forĵetu vian verkon kaj rekomencu. Do, la artikolo devas ekinteresigi legantojn pri Esperanto.

4. Konsideru nepre, por kia revuo aŭ gazeto vi skribas: se por la urba - substreku, ke la tendaron vizitis tiom da homoj el via urbo, mentru la laboron de via urba klubo. Eĉ se vi skribas pri interlingvistiko, penu ligi ĝin kun enurbaj eventoj. Se vi skribas por junulara gazeto, substreku, ke ĉi tendaron (aŭ renkontigon) partoprenis junaj homoj, studentoj, komsemlanoj. Memoru, ke la sama artikolo ne

taŭgas senŝanĝe per du diversaj gazetoj, ĉar ĉiu gazeto havas sian specifecon.

5. Nepre necesas ĉiam strebi ligi E-aferojn kun lastaj tutmondeaj aŭ tutlandaj eventoj, ekzemple SEJM-17 estis dediĉita al la 30-jara jubileo de la Venko aŭ la lastaj renkontigoj dum la novembrofestatoj havis ĝeneralan titolon: "Esperantistoj - por la XXV kongreso de KPSU".

6. Viaj artikoloj, kiam ili estas portataj en redakcion, devas havi decan aspekton: ili devas esti skribitaj legeble (eble eĉ tajpitaĵ), sen gramatikaj eraroj kaj forstrekoj. Nepre necesas ankaŭ subskribi sian artikolon: la nomo, patronomo, familia nomo, profesio, laborloko. Poste nepre devas esti via hejma adreso, - anonaman artikolon aŭ artikolon sen adreso oni ne publikos, eble eĉ ne legos.

Jen estas kelkaj konsiloj por homoj, kiuj ne havas ankoraŭ skribopraktikon.

N.Korĵenevskaja (Ufa).

ATENTON, KOLEKTANTOJ!

Multaj sovetiaj esperantistoj ion kolektas. Tial ĉi ĉi decide de la SEJM-Komitato fendi kolektantan fakon estas laŭdirinda kaj ĝustatempa, ĉar Esperanto-kolektado devas esti organizita, por ke la kolektantoj estu informitaj pri ĉiuj novaĵoj, ricevu konsilojn kaj okazon interŝanĝe akiri bezonatajn kolektoobjektojn.

Estu permesate prezenti la provizoran agadsferon kaj laborplanon de la Kolektanta fako dum proksima tempo:

- unuigi ĉiujn sovetiajn esperantistojn-kolektantojn, interesigantajn pri E-poŝtmarkoj kaj specpoŝtstampoj, E-insignoj kaj glumarkoj, E-afiŝoj, E-kovertoj kaj paperfolioj;
- akumulado sovetiajn E-aferojn por interŝanĝi kun eksterlando kaj por helpi akiri ilin al fakuloj mem;
- kontakti kun eksterlandaj E-organizaĵoj de kolektantoj kaj helpi al dezirantoj aliĝi al ili aŭ publikigi en iliaj bultenoj anoncojn;

- organizi interŝanĝojn inter E-kolektantoj de Sovetio;
- aperigi bultenon kun adresaro komence de 1976;
- eldoni specialan surbrustan insignon de SEJM-kolektanto;
- de tempo al tempo publikigi en "Aktuale" novaĵojn pri kolektado, pri laboro kaj atingoj de la Kolektanta fako.

Do mi kore invitas ĉiujn esperantistojn-kolektantojn de USSR aliĝi al la Kolektanta fako kaj aktive partopreni ĝian organizan laboron. Por aliĝi al la fako sufiĉas sendi aliĝilon kaj 2,0 rb., kio krom ĉio donas rajton senpage ricevi la bultenon kaj la insignon. La aliĝilojn kaj monon sendu al V.Baniulaitis: ab/d 168, 235800 Klaipėda-C, Lit. SSR.

Por efektiviĝi la supremencitajn celojn la fako u r ĝ e bezonas laborgrupon. Kiu estas preta kunlabori, bv. senprokraste sendi sian konsenton kaj proponojn.

La Kolektanta fako atendas reeĝon de ĉiuj kolektantoj!

=====

A L I Ĝ I L O al la Kolektanta fako ĉe SEJM

- Nomo, antaŭnomo.....(skribu preslitere!)
- Preciza poŝtadreso.....(skribu preslitere!)
- Mi pretas a)kunlabori en laborgrupo.....(jes,ne)
- b)repzenti la fakon ĉe klubo (rondo)en.....(jes,ne)
- Mi petas publikigi en la bulteno jenan anoncon.....
- Diversaj proponoj aŭ deziroj.....

Dato

(subskribo)

V.Baniulaitis, estre de la Kolektanta fako.

## DO, ESTU SEJT...

...estu la 18-a en Tiŝvin, - tiun ĉi decidon de la pasintjara SEJM-Konferenco finaprobis la Komitato post pridiskuto de ĉiuj argumentoj de la Klubo-Mastro la 2-an de januaro 1976. Sendube, la decido estas fierinda por tiŝvinanoj. Por organizi dignan tendaron al la dekjara SEJM-jubileo ĉiuj ni pretas ŝvite labori dum la tuta jaro. Tamen, memorante, ke SEJT-preparo devas esti komuna afero de ĉiuj kluboj, mi havas kelkajn urgajn petojn al la legantoj de "Aktuale".

- Antaŭ SEJT, dum la labortagoj de la X-a Konferenco, por la progresantoj ĉiesklubaj estas planata kvintaga Paroliga periodo. Dum PP la progresantoj devas ekmajstri la parollingvon, sed krom tio ankaŭ ricevi turistan praktikon, ellerni ioman kvanton da kantoj kaj prepari parton de la tendaraj programeroj. Por efektiviĝo de ĉio, menciita supre, estas bezonataj: 1) lingvoinstruantoj - 8 personoj, 2) gitarludantoj - 9 personoj, 3) spertaj turistoj - 6 pers., Se unu ulo (ulano) kapablos plenumi du aŭ eĉ tri menciitajn taskojn - des pli bone. Tamen ĉiu el tiuj personoj devas a) flue paroli en E, b) ne timi kvintagan paroladon kaj mirindan turistan vivon, c) ne tre bedaŭri, ke ne partoprenos la Konferencon. Mi petas ĉiujn klubojn urĝe pripensi tion, kaj elekti volontulojn, kiuj same urĝe anoncu sin al mi por tuj ricevi detalajn klarigojn kaj taskojn.

- Sperto montras, ke la gvidantoj de la plej gravaj tendaraj laboroj la organizantoj de SEJT devas difini pli frue ol venas la aliĝiloj de partoprenantoj. Pro tio mi aldonas al ĉi artikolo la liston de tendaraj laboroj, kiuj postulas gvidantojn jam nun por prepara periodo. Ĉiu aktivulo atente trarigardu la liston kaj kaj elektu la laboron, taŭgan por si. Post la elekto urĝe informu min pri tio. Partoprenon en la Konferenco aŭ la Paroliga periodo la elektita laboro ne influas.

- La organizantoj planas eldoni por la tendaranoj specialan tendaran libron. La enhavo de la libro estas jam provizore pridiskutita en la Komitato, tamen mi petas vin sendi ankaŭ viajn proponojn. Kiujn utilajn informojn vi ŝatus trovi tie, kiujn kantojn amatajn ktp.?

- Kaj por la fino pete tre grava. La kvanto da lokoj en SEJT estas limigita. Por laŭeble kontentigi ĉiujn klubojn dum distribuo de la lokoj, mi petas la klubestrojn sendi mendojn pri la bezonata kvanto da lokoj al mi ĝis la 15-a de februaro. Dum la distribuado la Prepara komitato konsideros la lokon, kiun okupis klubo en la Socialisma konkurado, la kluban mendon kaj aktivecon de klubo dum la prepara periodo (laŭ la respondoj al la supremenciitaj petoj). Ĉiuj volontuloj por la Paroliga periodo kaj eventualaj gvidantoj de la tendaraj laboroj post ilia konfirmo en la "posteno" estos akceptitaj al SEJT ekster la distribuo.

Preparante viajn respondojn ne forgesu, ke ĉiuj petoj estas urgaj. Sendu la respondojn al la adreso, kie ilin senpacience atendas la v/p pri tendaraj aferoj M. Bronŝtejn:

1875000 Leningradskaja obl., T I Ŝ V I N, I-Mikrorajon, 44, kv.22.

Tendaraj laboroj

La Tendara komitato serĉas volontulojn por okupi vakantajn postenojn en SEJT-18 el la sube prezentata listo kaj dediĉi duonjaron al preparado de la tendaro.

- |  |  |
|--|--|
| 1. Belartaj konkursoj (gvidantoj kaj ĵurianoj) | 7. Elekto de Miss kaj Mister Esperanto (organizanto) |
| 2. Bela lego (organizanto de la konkurso)      | 8. Fotoservo (gvidanto)                              |
| 3. Danevesperoj (gvidanto)                     | 9. Gaja vespero (organizo)                           |
| 4. Deĵorestro                                  | 10. Gimnastiko; matena (gvidanto)                    |
| 5. Ekspedicioj (organizanto)                   | 11. Interpretista konkurso (organizanto, ĵurianoj)   |
| 6. Endormigo (hipnotisto)                      | 12. Ilustra grupo (pentristoj)                       |

- 13. Informejo (estro)
- 14. Jurnalista grupo
- 15. Kantoj (instruantoj)
- 16. Krokodilĉaso (gvidanto)
- 17. K G S (organizantoj)
- 18. Komsomolestro
- 19. Koncertoj (gvidanto)
- 20. Kuracisto
- 21. Legejo (gvidanto)
- 22. Loterio (organizantoj)
- 23. Ludoj societaj (organizantoj)
- 24. Lumbilda vespero (organizanto)
- 25. Magnetofona serve (gvidanto)
- 26. Mangejo-estro
- 27. Maske-balo (organizantoj)
- 28. Murgazeto (estro)
- 29. Naskiĝinto-feste (organizantoj)
- 30. Oratora konkurso (spertulo)
- 31. Orientacia konkurso (helpantoj)
- 32. Pedagogia seminario (gvidanto)
- 33. Primovada lernejo (gvidanto, prelegantoj)
- 34. Prizorgo de infanoj (respondeca)
- 35. Regionaj kunvenoj (respondeca)
- 36. Sociologia enketado (estro-organizanto)
- 37. Somera Universitato (rektoro, prelegantoj)
- 38. Spertaj konkursoj (organizantoj)
- 39. Statistiko tendara (estro)
- 40. Seminario de pacaktivuloj (gvidanto)
- 41. Tradukista kurso (gvidanto)
- 42. Tradukista konkurso (organizo)
- 43. Vikterino (organizantoj)

M. Bronštejn, v/p pri tendaraj aferoj

### PRI KIO INSTRUAS NIN LA FIASKO EN LITOVIO?

Litovio estis bastiono de E-movado en nia lando. En la jaro 1967 tie-ĉi okazis fakta E-kongreso kun partopreno de eksterlandanoj. La plej bonaj tendaroj, "Horizontoj de Sov. Litovio", vizito al kongresoj, vortaroj kaj libroj, tradukitaj el E, 6200 E-istoj, oficiala favora permeso de Ministro enkonduki E-on en lernejojn, E-grupoj ĉe institutaj katedroj... Jam ĉio estas en pasinto. ~~Ĝi~~ Home, kiu legis la konfesion sub la titolo "Nuboj en la litova ĉielo" ("A"-11), scias, al kiu ni dankas pro tiu fiasko, frakaso de E-movado.

La deziro per unu foje alsalti la montopinton anstataŭ anstataŭ grimpi laŭ ĝiaj deklivoj estas tipa por multaj E-istoj. Ilin obsedas la ideo kapti ĉa plej influivan personon, konvinki lin pri nia afero kaj tiamaniere venki sen ĉiutaga streĉa laboro. La ekzemplojn - trovu en nia historio mem, mi ne volas, ke entiu esee aperu paraleloj... Do, la 28-an de aŭgusto tri personoj sendis leteron al la respublika CK de partio. Ili kvazaŭ speciale elektis la plej malfaveran tempon. La rikolto en tiu jaro estis la plej malgranda, kaj CK, certe, okupiĝis pri pano nia ĉiutaga, kaj tia luksaĵo, kiel E, al ili ŝajnis tre ekzotika. Krome, ankoraŭ daŭris postsekvoj de la nefavoraj aferoj en Litovio en majo 1972. Tamen la tri personoj, ne esploriginte bone la aferon, ne konsiderinte la foriron de tiuj personoj, kiuj, laŭ ilia opinio, favoris al E, sinturnis al CK kaj ricevis negativan ~~papere~~ <sup>res-</sup> <sup>pendon,</sup>

en kiu la Ministro malkonsilas al lernejoj okupiĝi pri E... Mi skribas pri tio kun granda doloro, ĉar la fiasko en Litovio vundis la movadon en la tuta lando. Se la tri gvidantoj pensus sobre, ili komprenus, ke membroj de la respublika CK ne estas lingvistoj, ili simple komparas la E-movadon en Vilniuso kaj Moskvo, konkludos, ke la unua superas la duan, kaj tute ne ekfieras pro la grandaj atingoj de la E-movado en Litovio. Tute male.

Senbaza fantazio, malakcepto de la realeco ĉiam estas punata. Kaj mi skribas tiun artikolon, forte dezirante, ke ~~la~~ nuboj, similaj al la litovaj, neniam kovru la tutlandan ĉielon, ĉar respublikajn fiaskojn, kvankam tre dolorajn, nia movado ankoraŭ supervivi povas...

Dum la decembra feste mi partoprenis parolon inter unu el la plej estimataj niaj E-veteranoj kaj la plej superaj SEJM-gvidantoj. Dum du minutoj oni pridiskutis kampanjon de E-istoj favore al liberigo de L. Korvalan. La veterano ilin benis, kaj per ili ĉio estis grava en

tiu komplikega demando. Politiko ne estas matematiko, pro kio oni pensu? Mi, havante sperton de laboro en unu el CK-aj ĵurnaloj, esprimis mian nekonsenton. Kolektivaj protestoj estas forta armilo, kaj ni uzu ĝin nur kun la tuta popolo, sub gvido de la partio, kiam la protestoj reeĝas en sovetaĵ ĵurnaloj.

Ni jam havas amaran sperton pri la rezolucio defende al Cipro. Ni ekis kampanjon, kiu ne sonis en nia soveta preseo. Feliĉe la rezolucio ne estis forsendita. (Mala ekzemplo: en la Kieva tendaro ni kune kun la tuta popolo protestis kontraŭ la murdo de kamarado Maĝub en Sudano). Tamen dezire ekkrii pli laŭte ol ĉiuj ceteraj regas en SEJM. La Korvalax-kampanjo baldaŭ ekiĝos. Sukcesoj? Ĉu pri tio ni pensu? La intencoj niaj estas bonaj. De, ĉu ni ne pavimas per ili la vojon al?..

Tiel statas la afero kun kampanjoj. Alia peno sursalti la montopinton estas la interkonsento MEM-Mondpackkonsilantaro. Decidoj de ĉiuj internaciaj organizaĵoj estas nur konsultaj al ŝtatoj-Membroj (tio rilatas ankaŭ al UNO kaj UNESKO). Same pro tio ŝtatoj forte protestas, kiam oni ŝajnigas tiujn decidojn kiel decidajn. Dum SSOD-kunsido A. Berjoza rekte kaj krude alpaŝis kontraŭ la decido de la Volgo-Urala renkontiĝo kontaktigi sovetaĵn packomitatojn kun la eksterlandaj. (Li eĉ promesis skribi al la Ufa-rajkomo per puni Ufan E-klubon). Kiam L. Medvedev parolis pri E-aferoj en Tutsoveta Packomitato, la tre favora kunparolante ekfuriozis, kiam li nur menciis tiun MEM-MPK interkonsenton. De dume vi komprenas - pro kio.

Rakontante pri tio, mi tute ne volas nei la planon pri pacmovado, kiun prezentis s-ano Podkaminer en "A"-11. Ĝi estas modesta kaj bona. Maltrankviligas min nur tiu "supersalto", kiu jam ricevis negativajn rebatojn.

Tamen la plej minaca por la E-movado ŝajnas al mi alia "fiksideo" de unu nia veterano. Li diradas: se ĉiutage frapi al la plej supera instanco, ni iufoje aktingos akcepton fare de la pleja ĉefulo, kiu per sia magia bastono selves ĉiujn niajn problemojn. Same tiel, diras li, okazis en GDR... Mi konsentus kun tiu persono, se li volus streĉe labori, grimpe, de detale esplori la instancojn, paroli kun gvidantoj de pli subaj organizaĵoj - labori same kiel iam filatelistoj, aŭspiciitaj de la heroo E. Krenkel. Tamen pro kio ni esploru fremdajn spektajn, serĉu influivajn homojn, kiuj nin reprezentos?

Unu renegato diradis: "Movado estas ĉio, celo estas nenio." Seni ne pensas same, ni ne mispaŝu, ni ne moviĝu nur por moviĝi. Gravas la direkte, gravas la ĉiutaga "grimpado", sed ne intencoj atingi ĉion per unu salto. Eble estas aliaj opinioj? Ni pridiskutu ilin...

A. Ĥarkovskij (Moskvo).

### TRADUKISTA KONKURSO 1975

La rezultoj de la tradukista konkurso por la 1975 jaro estis jam menciitaj ("A"-24, p. 122), tamen estas inde diri kelkajn vertojn pri la konkurso mem.

La konkurso estis anoncita duŝtupa, tamen la dua ŝtupo ne okazis pro malfruiginta organizo de la ŝtupo unua.

*konkurs* Por la ŝtupo estis proponita rakonto de K. Paustevskij "La kordo", kiu enhavis 8. 4200 signojn, kio egalas proksimume dekonon de presfolio. La konkurson partoprenis 16 personoj, kio superis la nombrojn de la partoprenintoj en la antaŭaj konkursoj. La unuajn tri lokojn gajnis: 1- Boris Kolker (Ufa); 2 - Mina Cvileneva (Ufa); 3 - Anatole Gončarov (Barnaul).

Krom la gajnintoj ankaŭ aliaj partoprenintoj meritas laŭdon pro la altnivela esprimpovo, trafaj eltrovoj en malfacilaj lokoj kaj nerigida lingvaĵo de la tradukoj malgraŭ iuj duagradaĵ eraroj. Inter tiuj nomindas gekamaradoj Palu, Leskuteva, Skvorcova, Lupickaja, Kozyreva, Ĉupilko, kiuj prezentis vere presindajn tradukojn.

(Daŭrigo en p. 9)

Юрий Яковлев

## ЦВЕТОК ХЛЕБА

Сколько маленький Коля помнил себя в войну, он всегда был голодным. Он никак не мог привыкнуть, приладиться к голоду, и его ввалившиеся глаза сердито поблескивали, постоянно искали добычу. Черноволосый, нестриженный, взъерошенный, с проступающими ребрышками, он был похож на маленького исхудалого волчонка. Он глотал в рот все, что было съедобным, — пшавель, вяжущие ягоды черемухи, какие-то корни, дикие лесные яблоки, пронзительно кислые и крепкие. Дома ему давали болтанку и хлеб. Мать добавляла в муку венники — вымоченные метелки проса, и хлеб был тяжелый, вязкий; от него пахло сырой глиной. Но и этот хлеб голодный мальчонка съедал мгновенно, жадно посасывая расдутыми ноздрями.

Один раз за всю войну он наелся хлеба в досталь. И хлеб был не из венников — настоящий. Его принесли с собой наши автоматчики. Они вошли в хату ночью. Их тяжелые шинели и сбитые сапоги были замазаны чем-то белым и фосфоресцировали в полутьме, словно к ним налипли хлопья снега. А на дворе шел дождь. Бойцы пришли не из степи, а спустились с меловых гор, спуск был трудным, и они замазались в мелу. В теплой хате от солдат шел банный пар, и сразу запахло табачным дымом, мокрыми портянками, ременной кожей и ароматным свежим зитником, который они выкладывали на стол.

От ночных гостей в хате стало тесно, как на вокзале, и маленький Коля почувствовал себя не дома. Он забился в угол и опасливо наблюдал за пришельцами. Тут его заметил скуластый солдат, прихрамывающий на левую ногу. Он поманил к себе Колю:

— Эй, хояин, пойд-ка сюда. Хлебушка хочешь?

Мальчику захотелось крикнуть: "Хочу! Хочу!" Но в горлу подкатил ком. Он не мог произнести ни слова и молча глотал слюну.

— Ты, наверно, плотно поужинал?

Коля растеряно заморгал, а скуластый солдат развязал мешок и сунул ему в руку большой кусок хлеба. У голодного мальчика закружилась голова. Он вскарабкался на печку, зажмурил глаза и припал к хлебу. Он дышал хлебом, ласкался к нему, согревал его руками и щекой. Он откусывал то мякиш, то с веселым азартом грне корку, и покойная сытость сладко разливалась по телу. Коля подобрел от хлеба, как верослине добрей порой от вина. Ему казалось, что все вокруг хлебное: и лежит он на хлебе, и под головой у него мягкий хлеб, и покрыт он теплым хлебом. Он уснул. И всю ночь ему снился хлеб.

... Когда война подходила к концу, мать посеяла на огороде полоску пшеницы. Вскоре из земли проклюнулись робкие всходы. Они были похожи на траву. Мальчик пожевал травинку и не почувствовал хлебного вкуса: трава как трава. Может быть никакого хлеба и не будет. Но трава начала сворачиваться в трубку.

— Скоро наш хлеб зацветет, — говорила мать.

И все ждали, и Коля ждал, и ему на память приходил свежий солдатский зитник и счастливая хлебная ночь, которая то ли была на самом деле, то ли приснилась. Коля ждал, что хлеб зацветет голубыми цветами или алым маковым цветом. А может быть, как вишня, покроется белой метелицей. Он так и не заметил, как цветет хлеб. Появились колосья — глазастые, голубоватые, чуть запотевшие. Потом полоска стала соломенной.

Когда собрали первый урожай, бабушка на радостях испекла два коржа величиной с подсолнух. Коржи были пахучие, румяные. Бабушка смазала их масляным перышком и посыпала солью, крупной, как голценое стекло. От коржей шел жар, и они светились, как два маленьких подсолненных солнца.

Мальчик сидел перед столом, и его ввалившиеся глаза приросли к коржам. Он ждал, когда ж его угостят, и вдыхал в себя теплый дух испеченного хлеба. Он еще сдерживался, чтобы не протянуть руку и не взять без спроса завидное угощение. Наконец бабушка подошла к нему и сказала:

— Сведай, внучок, моего коржа.

Какая-то скрытая пружина сработала внутри - руки мгновенно устремились к коржу, пальцы крепко схватили его и потянули в рот. Корочка обжигала губы, соль пощипывала язык, ноздри раздувались, боясь упустить толику вкусного запаха. Нет, корж был повкуснее солдатского титника, но он таял с неудержимой силой, и вскоре в руке мальчика остался тоненький полумесяц. И его скоро не стало... Коля обливал губы, обливал пальцы и тяжело выдохнул. А второй корж, румяный, целехонький и наверняка еще более вкусный, лежал на столе и призывно улыбался всей своей рожицей.

- Отнеси этот корж деду, - сказала бабушка.

- Давай отнесу, - упавшим голосом сказал Коля.

Дед был очень старин и жил на пасеке. Домой он приходил в те редкие дни, когда на огороде топили прокопченную, покосившуюся баньку. Все лицо деда заросло щетиной, словно из подбородка и щеки торчало множество железных гвоздиков. Коля боялся приблизиться к деду, чтобы не уколоться.

Бабушка завернула горячий корж в лопух и протянула его Коле. Сперва он нес свою дорогую ношу в руках. Потом лопух пришлось выбросить, а корж спрятать за пазуху, чтобы его не отняли мальчишки. Корж был горячим, он жег кожу, а крупная соль вьедалась в обожженное место. Коле казалось, что он несет за пазухой сердитого зверька, и зверек кусает его в живот. Но он терпел. Он прошел мимо мальчишек, и они не заподозрили, какой вкусный гостинец спрятан у Коли за пазухой.

Дед не слышал прихода внука. Он сидел перед пчелиным водоемом - перед желобком, по которому текла вода. Пчелы облепили желобок и пили, опуская хоботки в прохладную воду. Дед подставлял руку, и вода стекала ему в ладонь. Он подносил ладонь ко рту и пил пчелиную воду, она была сладковатой. Пчелы ползали по плечам, по голове деда, забирались в ушную раковину. Они не кусали деда. Сны его признавали за своего.

Дед обрадовался. Он вертел корж в руках и нюхал. А Коля стоял перед стариком, поглощенный надеждой, что дед разломит корж пополам.

- Хороший корж, - сказал дед.

- Хороший, - тут же согласился Коля.

- Без немцев и земля лучше родит! - Дед опустил руку с коржом.

- Как там бабка-то? Ползает?

- Ползает, - выдохнул мальчик и, чтобы не думать больше о корже, спросил: - Дед, а тебе медаль дадут за немцев?

- Зачем медаль? - сказал он. - Мне бы здоровья.

Дед не стал есть гостинец, а отнес его в шалаш. До чего же каменный дед! Совсем одичал со своими пчелами. Он специально спрятал корж, чтобы не делиться и потом спокойно жевать его, макая в липкий гречишный мед.

Коля собрался уходить. В последнюю минуту, когда дед протянул котомку с горячим бельем - пусть бабка простирнет! - у Коли что-то дрогнуло, и он чуть не попросил у деда кусочек коржа. Но сумел побороть минутную слабость. И промолчал.

Он шел не спеша, размахивая котомкой, и думал о том, что, когда кончится война, в доме будет много хлеба и он будет есть коржи угром, в обед и вечером. А сейчас корж ест дед - он, Коля, уже съел свой. Мальчик представил себе деда, который долго перемальивает беззубым ртом запеченную корочку. Старый, наверное, и вкуса-то не чувствует.

Дома он сунул бабушке котомку и буркнул:

- Дед велел простирнуть!

- Как он там, не болеет? - насторожилась бабушка.

- Чего ему болеть-то? - сказал Коля. - Пасет себе пчел.

Бабушка молча принялась выкладывать на лавку дедушкино белье, рассматривая, где надо заштопать, где залатать. На дне котомки оказалась чистая тряпица, завязанная узлом. Бабушка неторопливо развязала непослушными пальцами узел. В тряпице лежал корж. Она ничего не сказала. Положила нежданый гостинец перед внуком.

Румяное, густо посыпанное солью солнышко ослепило мальчика. Он проглотил слюну, предвкушая угощение, и протянул руку к коржу. Но



какое-то незнакомое чувство удержало его руку. Это чувство оказалось сильнее голода, важнее хлеба. Значит, дед не жует корж и не макает его в горчичный мед, а пьет свою подслащенную водичку, которая заглушает голод, и пчелы ползают по его плечам... И он боевал с фашистами, а медали ему не надо.

Коля сполз со скамейки и пошел прочь... Но через некоторое время он вернулся. Взял со стола остывший корж. Аккуратно завернул его в чистую тряпицу и положил в дедушкин сундук, где лежали старые сапоги, папки, драгва, мешок с самосадом и штык, привезенный с прошлой войны.

Proksimuma listo de teoria literaturo pri la  
problemoj de tradukarto

1. К. Чуковский. Высокое искусство. "Советский писатель", М., 1964.-69.
2. А. В. Федоров. Основы общей теории перевода. "Высшая школа", М., 1968.
3. Мастерство перевода /сборник статей/. М., 1959, 1963-65, 1968-72.
4. Вопросы теории художественного перевода. Сборник статей. "Худ. литература", М., 1971.
5. Вопросы художественного перевода. Сборник статей. "Советский писатель", М., 1955.
6. Л. С. Бархударов. Язык и перевод. "Международные отношения", М., 1975.
7. Е. Г. Эткинд. Поэзия и перевод. Ленинград, 1963.
8. Е. Г. Эткинд. Русские поэты-переводчики от Тредиаковского до Пушкина. "Наука", Л., 1973.
9. Г. Р. Гачечиладзе. Вопросы теории художественного перевода? Тбил., 1964.
10. Гиви Гачечиладзе. Художественный перевод и литературные взаимосвязи. "Советский писатель", М., 1972.
11. И. И. Ревзин и В. Ю. Розенцвейг. Основы общего и машинного перевода. М., 1964.
12. В. Н. Комиссаров. Слово о переводе. "Международные отношения", М., 1973.
13. Ирки Левый. Искусство перевода. "Прогресс", М., 1974.
14. П. И. Копанев. Вопросы истории и теории художественного перевода. Изд-во БГУ, Минск, 1972.
15. Редактор и перевод. Сборник статей. "Книга", М7, 1965.
16. Р. К. Миньяр-Белоручев. Пособие по устному переводу. "Высшая школа", М., 1968.
17. Віктор Копілов. Першотвір і переклад. "Дніпро", Київ, 1972 р.
18. Тетради переводчика. № 1-12, 1963-75 г.г., Изд-во Института международных отношений.
19. Я. И. Рецкер. Теория перевода и переводческая практика. "Международные отношения", М., 1974.

(Daŭrigo el la paĝo 6.)

Mi ne povas fari komparojn inter la tradukniveloj de la antaŭaj konkursoj kaj la lasta, sed mi povas konstati, ke ĝenerale la nivelo estas bona, sed oni povas senti ĉe plejparto de la partoprenintoj foreston de teoriaj scioj pri la tradukarto, sen kiuj ne estas eble fariĝi tradukmajstro. Do por la teoria klerigo ĉi-supre estas proponata listo de teoria literaturo pri la tradukarto. Same mi proponas por la tradukista konkurso 1976 rakonton de Ju. Jakovlev "Cvetok ŝleba". Dumtendare iu insistis, ke teksto por la konkurso estu pli longa kaj ne tiom facila, do estu tiel.

Do, estimataj tradukemuloj, ligu teoriajn sciojn kun la praktika posedo de nia neelĉerpeble riĉa Esperanto, traduku abunde ne nur por la konkursoj, sed ankaŭ por ĉvita ekzercado, kaj rezulte viaj tradukoj belsonos same kiel la originaloj.

Viajn tradukojn sendu al V. Samodaj: 113519 Moskva, Krasnogo Maj-ska, 8-2-107.

V. Samodaj, estro de la Traduka fako.

LENIN MEMION SKRIBIS PRI E

Mencio pri nia lingvo forestas kaj en la plena verkaro de V.I.Lenin kaj en la aprobita kvinvoluma rememoraĵa eldono pri li. La Instituto de ML kelkfoje oficiale ripetis tion en respondoj al E-istoj. Tamen en la listo pri famaj homoj, kiuj opinias pri E ("A"-6, p.69), denove figuras nekzistanta eldiro de Lenin. Nur tiu povas malfidigi la tutan liston. Mi jam ne parolas, ke simila falsajo laboras kontraŭ E.

Due, la citaĵoj mem, sen kunteksto nur nebulose respegulas la penson de la aŭtoro. Mi jam ne parolas, ke iu aŭtoro povas ŝanĝi la opinion. Por ekzemplo, L.Tolstoj favoris al E, opiniinte ĝin "kristana afero", tamen li opiniis la lingvon netaŭga por kontaktoj kun Oriento. Ciolkovskij inventis propran lingvon ktp.

Eble paralele kun la listo iu malkovros ĝian enhavon, esploros la rilaton de famaj homoj al E?

A.Ĥarkovskij (Moskvo).

"ESPERANTO KAJ NATURO" - VII

Okazos la 3-11-an de julio 1976 en Latvio.

Bulteno-1

La ĉefa celo de la renkontiĝo - seminario estas praktike ekkoni la naturon (arbaro, birdoj, trogherboj... kaj la homo kiel "reĝo"). LOKO. La plej proksima urbo estas Ventspils. La cirkonstancoj estas sovagej - ĉirkaŭas nur arbaroj. La plej proksima stacio (fervoja) -ĉ. 5 km da piediro.

LOGADO: En propraj tendoj. Kiuj ne havas tendojn, povas noktumi en fojnejo. La litaĵoj mankas.

MANGADO: El la komuna kaldrono. La "sovaĝa" mangopreparado ebligas nutri ĝis 100 personojn. Elspezoj por la mango ĉ. 1,50 rb. tage.

ALIGO: Bonvolu sendi jenan aliĝilon:

ALIGILO AL "ESPERANTO KAJ NATURO" - VII

en Latvio, 3-11.VII.1976

- 1. Familinomo, antaŭnomo:.....
- 2. Poŝta aŭ hejma adreso:.....
- 3. Nomo kaj adreso de E-klubo aŭ E-rondo:.....
- 4. Viaj interesoj:.....
- 5. Naskiĝdato:.....
- 6. Kleroj:.....
- 7. Profesio:.....
- 8. Particeco:.....
- 9. Nacieco:.....
- 10. Jaro de esperantistiĝo:.....
- 11. Partopreno en E-tendaroj kaj E-renkontiĝoj:.....
- 12. Kion vi proponas por la tendara programo kaj kion vi povas fari? ..

Mi promesas subigi al la tendara programo kaj disciplino.

Dato:..... Subskribo:.....

Rekomendas:.....

La aliĝilon bonvolu plenigi klare kaj sendi ĝis la 1-a de majo al la sekretariino de "Esperanto kaj Naturo"-VII: Estonio, Tallinn 200090 p.k. 264, Helgi Kreem.

Kiuj sendos aliĝilon, ricevos la duan bultenon.

ALIGKOTIZO: 4 rb; por lernantoj kaj studentoj 2 rb.

PROGRAMO: Dependos de via aŭtobra aktiveco. Certe estos: rekta studado pri la naturo, prelegoj, ekskursoj, ekspozicioj, viktorino (pri konado de la naturo), diskutoj, oratora konkurso, koncertoj (la croj parkerigitaj hejme), komuna kantado kaj ŝercoludoj. Dezirinde estus, se la programeroj konformus kun la ĉefa celo.

RIMARKO: Unu ekspozicion ni deziras aranĝi per diversaj presitaj propagandiloj pri la naturo kaj ĝia protekto.

Bonan ekzemplon ĉi-rilate montris s-ino Lidia Dimitriŝina el Moldavio, kiu ilustris per la materialo sian prelegon en "EkN"-VI. Post la tendaro ni montris la materialon al la Estona nat-urprotektita Ministerio. Oni estis dankaj kaj promesis trovi reciprokek propagandmaterialon por sendi al s-ino L.Dimitriŝina.

NI DEZIRAS AL VI AKTIVE ĜUI LA BELEGON DE LA NATURO EN LA NOVA JARO!

La komitato.

### INFORMO SERĈATA!

La "Problema grupo pri la demando de internacia helplingvo" (Instituto de lingvistiko, Moskvo) enmetis en sian programon preparon de kolektiva monografio pri la temo: "Historio de la ruslanda kaj sovetunia interlingvistiko". La monografio sumigos interlingvistikajn esplorojn en nia lando de post la apero de unuaj volapjukistaj kaj esperantistaj grupoj.

Grava etapo en la historio de nialanda interlingvistiko estas la agado de la Petrograda societo "Kosmoglot", fondita en marto 1916. La societon estris W.K.Rosenberger, iama Direktoro de la Akademio Volapjuka; la honora prezidento de "Kosmoglot" estis I.A.Baudouin de Courtenay, elstara lingvisto, unu el la ĉeffondintoj de la moderna lingvoscienco. La membroj estis: V.E.Ĉesihin, P.E.Stojan, W.F.Szmurlo, E.K.Drezen, Ja.Linzbach, H von Wahl, N.V.Yushmanov k.a.

La fondon de la societo antaŭiris preparaj diskutoj kaj laboroj, komencitaj ankoraŭ en Riga 1912-14 inter W.F.Szmurlo, P.E.Stojan kaj V.E.Ĉesihin; la ideo fondi la interlingvistikan societon apartenas al la lastenomita.

En 1916-18, laŭ iniciato de E.K.Drezen, en la Petrograda Teknologa instituto okazis paroladoj de Romanov, Drezen, Rozenberger, Stojan, Ĉesihin pri mondlingvaj temoj. Estis eldonitaj propagandaj materialoj, interalie poŝtkartoj kaj kovertoj kun sciigoj pri "Kosmoglot".

Post la intercivilitana milito la societo estis restarigita en Reval (nun: Tallinn) sub la nomo "Kosmoglott"; ĝin gvidis E. von Wahl kunlabore kun W.F.Szmurlo kaj Ja. Linzbach. La reorganizita societo ne plu entenis esperantistojn; ĝi fariĝis la unua ĉelo de adeptoj de Occidental (artefarita lingvo, inventita de E. von Wahl)...

Bedaŭrinde oni ne scias multon pri la agado de "Kosmoglot(t)"; estas necesaj informoserĉoj en la bibliotekoj de Riga, Leningrad, Tallinn. La "Problema grupo" multe bezonas kunlaborantojn en la nomitaj urboj, kiuj povus listigi materialojn pri "Kosmoglot(t)" kaj la menciitaj membroj de la societo; oni povas esperi, ke veteranoj de la internacilingva movado ankoraŭ memoras la nomitajn interlingvistojn. Ĉiujn sciigojn oni direktu al:

Kuznecov Sergej Nikolaeviĉ, 103050 Moskva, ul.Gerjkege 19, kv.67.

### KRASNOJARSKA ESPERANTO-KLUBO EKZISTAS!

Post la tendaro ni firme decidis fondi urban klubon. Kiel? Certe, estis multe da problemoj. Oni al ni helpis. Helpis komitatanoj el la komsemola organizaĵo de l' universitato, el la gorkomo de VLKSM. Jam la 10-a de septembro estis sukcesoplena: ni ricevis ejon en la urba Palaco de kulturo, oni informis nin pri neceso prepari dokumentojn por oficialigo de la klubo ĉe la gorkomo de komsemolo. Ni kunvenis kaj decidis: fondi E-klubon surbaze de la E-sekcio de KID ĉe la universitato. La lasta restu nia filio ĉe la universitato.

Krasnojarskanoj preparis ĉion necesan por la oficialigo: planojn de la laboro, statuton, membraron kaj estraron de la klubo kaj:..kun bruo fiaskis dum la kunsido de la buroo de l' gorkomo, dediĉita al tiu demando. Estis miskompreno. Nia fiasko okazis la 12-an de septembro.

Sed post du monatoj, kiam ni jam faris sufiĉe grandan laboron, kiam ni daŭris ekzisti ne tre oficiale, sed efektive kiel urba klubo, - oni agnoskis nin. Kaj la samaj kamaradoj akceptis decidon: "Fondi urban klubon de esperantistoj...". Tio ĉi okazis la 24-an de decembro; Kaj tiu ĉi dato estas memoranda ne nur por krasnojarskaj esperantistoj, ĉu?

Kion ni faris? Kunsidis kaj konversaciis: ofte, interese, brue, sed ankaŭ kun utile per nia komuna afero. Informadis: dum la pasinta periodo en la urba gazeto ni aperigis ĉ. 12 sciigojn, artikolojn, anoncojn (precipe en "Universitata vivo"); novembre ni dufoje elpaŝis laŭ la krasnojarska televido (entute ĉ. 25 minutojn); faris 10 publikajn prelegojn, eldonis kelkajn murgazetojn en la rusa per vasta aŭditorio, organizis konstantan standon de E-korespondadoj kaj okazajn ekspoziciojn de E-literaturo (ĉ. 10). Ni ne nur uzas ĉiun eblicon por propagandi, sed ankaŭ serĉas ilin. Posedas fortojn nia koncerta brigado: ĝi jam havas sukceson kaj sperton de publikaj elpaŝoj.

Esperanto sekcio de KID ĉe la Krasnojarska universitato ankaŭ bone progresas: ĝi nun ekzistas kiel fako de la fakultato de sociaj profesioj ĉe la universitato. Ĝian laboron gvidas E.Sudareva. 15 personoj studas E-on kaj laboras por ĝi. Dum la 4-a tutuniversitata konferenco de komsomolo mi faris 15-minutan informon pri laboro de la universitataj geesperantistoj. Ni petas samideanojn memori: la E-sekcio kaj E-klubo ne estas la samo, - ili estas apartaj E-organizaĵoj, kiuj bone kontaktas.

La urba klubo organizis ĉi-jare urban E-kurson. Post prelegoj kaj anonco en la regiona reklamgazeto ni fondis du grupojn po 30 homoj. La konsisto de la grupoj estas preskaŭ plene studenta. Ni jam organizis ankaŭ lernejan rondeton kaj rondeton en la Palaco de pioniroj.

La estraro kontaktas kun diversaj urbaj organizaĵoj: kun la loka KZM, kun lokaj KID-oj k.a.

Nuntempe en la klubo laboras 20 membroj kaj 11 kandidatoj. Ne ĉio estas glate: ni ankoraŭ pasas la organizan periodon. Sed estas bona kolektive, granda deziro kaj bonhumoro. Skribu al

Skribu al ni, geamikoj! Ni estas Krasnojarska Esperanto-klubo: 660075 Krasnojarsk-75, p.k. 2420.

V.Sapojnikov, prezidanto de Krasnojarska E-klubo.

#### EN LENINGRAD LA 5-an DE DECEMBRO

De la 5-a ĝis la 7-a de decembro en Leningrad trapasis esperantista renkontiĝo. Partoprenis 11 aliurbanoj kaj 6 leningradanoj. Estis prezentitaj Moskvo, Harkov, Vilnius, Tallinn, Riga, Pskov kaj Tiŝvin. Dum la unua kunsido oni pridiskutis problemojn pri la esperantista movado en la prezentitaj urboj. Tagofine la partoprenantoj elpaŝis dum la vespero "Interteŭjo" ("Interĉajnik"), organizita de la Leningrada ŝtata universitato, kiun partoprenis eksterlandaj studentoj kaj aspirantoj de la universitato. Antaŭ ili elpaŝis A.Harkovskij, kiu rakontis pri la lingvo, Valeria Cvetkova, rakontinta pri renkontiĝoj, precipe pri la kongreso, okazinta en Peĉ (Hungario), kiun ŝi partoprenis.

Sekvintatage okazis kunsido de SEJM-komitatoj, ekskurso tra la urbo. Vespere la gastoj vizitis la teatron je la nomo de Puŝkin.

Unu el la plej interesaj eroj estis vizito al la universitato kaj konatiĝo kun laboro de la komputilo "ODRA", kiu adiaŭe ludis la melodiojn de "Tendaraj fajroj" kaj "Aŭtuno".

De la nomo de leningradanoj permesu al mi danki pere de "A" ĉiujn partoprenintojn de la renkontiĝo pro ilia ĉeesto kaj helpo per laborsperto, kiu nun estas tre bezonata al nia junulara grupo.

M.Gilinskij (Leningrad).

## NOVJARA RENKONTIĜO EN MONTARA ULBINKA

Sufiĉe interesa Novjara renkontiĝo okazis inter membroj de la E-klubo "Verda Horizonte" (U-kamenogorsk) kaj "Oazo" (Barnaul). Jam delonge niaj du kluboj kolektiĝas en pitoreskaj lokoj de la Montara Ulbinka apud Ust-Kamenogorsk, tamen renkonte de Nova jaro en la Montara Ulbinka estis organizita la unuan fojon. Malgraŭ tio la renkontiĝo pasis sufiĉe bone.

La 31-an de decembro je la 14-a horo ĉiuj partoprenantoj per speciala trafikilo elveturis en la montojn, kie en malgranda dometo E-istoj de U-Kamenogorsk jam ĉion preparis por renkonte de la Nova jaro. Laŭ la programo je la 19 komenciĝis la festeno, dum kiu estis proponitaj multaj testoj por la nova jaro kaj Esperanto. De la 24 ĝis la 4 horo estis la plej interesa tempo de la festeno: sonis kantoj, ĉercoj, rido, muziko... La partoprenantoj dancis, ĝojis, ludis - la Novjara nokto pasis einterese kaj gaje.

En la sekvantaj du tagoj okazis skiaj marŝoj laŭ pitoreskaj lokoj de la Montara Ulbinka. La novjaruloj skiis, naĝis en neĝoondoj k. t. p. - ĉiu laŭ sia scipovo. Vespere en la malgranda dometo sonis muziko, okazis malgrandaj improvizitaj koncertoj kaj, certe, denove kantoj. La 3-an de januaro niaj karaj gastoj kun bona humoro forveturis en sian urbon. Ĝis revido, geamikoj! Ĝis revido!

Ni esperas, ke niaj novjaraj renkontiĝoj fariĝos tradiciaj, kaj la sekvantaj renkontoj de Nova jaro estos pli bonaj ol la unua.

V. Ĉemberisov (Ust-Kamenogorsk).

## ZAMENHOF-VESPERO EN LA KLUBO "SUDUVA"

La 13-an de decembro en Kapsukas okazis renkontiĝo, dediĉita al la dujara jubileo de la klubo kaj la 116-a naskiĝtago de L. Zamenhof. Pri la fondiĝo de la klubo en la urbo Kapsukas rakontis la prezidanto V. Olsanskas. Pri L. Zamenhof parolis gastino el Lindvinavas (regiono de Kapsukas) k-ine Trimakiene. Post la oficiala parto ni kantis novajn kantojn kaj ludis. Entute partoprenis 14 personoj. Venis reprezentantoj el la urboj Kaunas, Prienaj, Lindvinavas, Vilkaviškis. Bedaŭrinde, neniu venis el Vilnius kaj aliaj urboj; nia klubeto ja preparis sin por pli multaj gastoj...

Nijolė Surdokaitė (Kapsukas).

## LA LOKO DE L' RENKONTO - MIASS

La 13-14 de decembro 1975 okazis renkontiĝo de uralaj E-istoj. Partoprenis 60 personoj: el Miass - 38, Celabinsk - 20, Korkino kaj Satka. La renkontiĝo estis dediĉita al la naskiĝtago de L. Zamenhof kaj havis en la programo jenajn erojn:

1. Prelego pri L. Zamenhof.
2. Vespero kaj kantoj de Zamenhof kaj pri Zamenhof.
3. Konferenco: a) E-klubo al la 25-a kongreso de KPSU; b) interŝanĝo pri sperte de gvidantoj de E-ŝtatoj; c) informado pri la E-movado en nia lando.
4. Rakonto pri veturado en Japanio kaj montrado de lumbildoj.
5. Filmo pri pasinta renkontiĝo de E-istoj en Miass.

La programo celis helpi al komencantaj E-istoj en praktika posedo de Esperanto. La plejam amason prezentis junularo. Estis multe da

---

\*Rimarko: laŭ la ĵus veninta raporto la klubo havas entute 7 membrojn; 4 aktivajn; La klubanoj estas oftaj gastoj en aliklubaj E-arangoj. Ili organizis 2 ekspoziciojn ĉi-aŭtune, okazigis 2 prelegojn kaj 1 E-koncerton. (Rim. de V. Šilas).

ŝercaj elementoj, kiuj havis instruan karakteron. Ĉiuj partoprenantoj ricevis enketon kaj vojplanon en E, kun helpo de kiu necesas trovi la ripozbazon, al kiu oni direktis sin. Ĉe la perdo de la ripozbazo ĉiu persono devis respondi tri demandojn Esperante.

Du tagojn sur la bordo de la lago Ĉebarkul sonis E-parolo, kantoj. Estis bonega vintra vetero, ni multe promenadis en arbaro, ludis, veturadis glacian karuselon. Ĉiuj bone ripozis. La gastoj diris fine: "Dankon, karaj mastroj! Se vi ankoraŭ organizos renkontigon, invitu nin, ni petas."

T.Keptjagina (Miass).

LA UNUA LISTO DE SEJM-DELEGITOJ (USSR)

(Mallongigoj: SD = SEJM-delegito, SVD = SEJM-vicdelegito.)

1. BARNAUL (Altaja reg.)

SD - Caldaev Viktor: 656023 Barnaul-23, str. Emilii Aleksejevoj, 32, loĝ. 27. (H. tel. 6-25-88).

SVD - Kazanova Valentina: str.656017 Barnaul-17, str. Papanincev, 205, loĝ. 19.

2. ĤARKOV (Ukraina SSR)

SD - Cibulevskij Dmitrij: 310024 Ĥarkov-24, str. Ĉajkovskogo, 25, loĝ. 11. (H. tel. 47-59-62).

SVD - Gončarov Aleksandr: 310144 Ĥarkov-144, str. Gv. Ŝironincev, 73 "G", loĝ. 17.

3. IVANOVO (RSFSR)

SD - Ivanov Vjaĉeslav: 153022 Ivanovo-22, str. Taŝkentskaja, 60, loĝ. 36. (Of. tel. 91-3-25.)

SVD - Sĉugusu Valentin: 153000 Ivanovo, str. Padgornaja, 4, loĝ. 1. (H. tel. 27-0-93).

SVD - Jirnova Galina: 153000 Ivanovo, str. Vancetti, 7.

SVD - Loskutova Tatjana: 153000 Ivanovo, per. Konspirativnij, 15, loĝ. 11. (Of. tel. 72-5-72, 2-51-02).

SVD - Talanov Jevgenij: 153000 Ivanovo, str. Sadovaja, 33, loĝ. 31. (H. tel. 91-9-82).

4. KIEV (Ukraina SSR)

SD - Lineckij Mihail: 252200 Kiev, Minskoje Ŝosse, 10, loĝ. 99. (H. tel. 35-94-25).

SVD - Sakoviĉ Aleksej: 252028 Kiev-28, per. Sovetskij, 51.

5. RIGA (Latva SSR)

SD - Silkalne Aina: 226011 Riga-11, str. K.Marksa, 69/71, loĝ. 44. (H. tel. 28-11-07; of. tel. 27-51-59).

SVD - Bercis Talis: 226018 Riga-18, str. Krasta, 5, loĝ. 33.

SVD - Kruze Silvija: 226052 Riga-52, str. Aglonas, 10, k.2, dz. 58.

6. SOĈI (Kaŝkezio)

SD - Pirojnaja Nina: 354000 Soĉi, str. Uĉiteljskaja, 22, loĝ. 43. (Of. tel. 92-44-94; h. tel. 92-36-63).

SVD - Bepalov Vladimir: 354054 Soĉi-54, str. Bytha, 45, loĝ. 2. (H. tel. 96-24-03; of. tel. 92-28-78).

7. UFA (Baŝkira ASSR)

SD - Kolker Boris: 450025 Ufa-25, ab/k 162 (poŝta adreso); Ufa, str. Mendelejeva, 215, loĝ. 153 (hejma adreso)

8. VILNIUS (Litova SSR)

SD - Silas Vytautas: 232009 Vilnius-9, str. Daukanto, 8, loĝ. 9. (H. tel. 6-86-59; of. tel. 6-97-34, 6-97-83).

SVD - Zambaite Nijole: 232034 Vilnius-34, str. Liepyno, 16/8, loĝ. 3. (H. tel. 73-06-17).

SVD - Vidngiryte Rita: 232034 Vilnius-34, str. Liepyno, 16/8, loĝ. 6. (H. tel. 73-07-17).

D.Cibulevskij, unua v/p de SEJM

"LA ANTIKVA RIGA" EN ELDONO

Somere 1976 la ŝtata eldonejo "Liesma" ("Flamo") intencas eldoni Esperantlingvan prospekton "La antikva Riga" pri la antikva parte de nia ŝefurbo, ĝia historio kaj ĝiaj vidindaĝoj. La broŝuro estos bele presita sur bona kreta papero kun multaj koloraj ilustraĵoj. La prezo, plej verŝajne, ne estos pli alta ol 50 kop.

La librovenda organizaĵo, ne havanta sperton pri vendado de Esperantaĵoj, kaj ne dezirante riski, proponis limigi la preskvanton de la broŝuro je 1000 ekz. Laŭ nia konsidero tiu kvanto apenaŭ sufiĉas por kontentigi la bezonojn de la latviaj E-istoj.

Por kuraĝigi la eldonejon fiksi pli grandan eldonkvanton estas necesaj antaŭmendoj. Bonvolu urĝe sendi antaŭmendojn, indikinte la kvanton de ekzempleroj, al:

Riga, bulv. Padomju 24, izdatelstve "Liesma", redakcija turistakoj literaturi.

Bonvolu diskonigi la enhaven de tiu ĉi letero al s-anoj, kiuj povus havi intereson pri akiro de la libreto.

Ni ne dubas, ke sukceso de la unua provo helpos al ni estonte aperigi pere de la sama eldonejo tutan serion de diversaj E-aĵoj. La ĉefa tasko estas nun montri, ke E-aĵoj estas tre postulataj kaj trovas aĉetantojn ĉie en nia granda lando.

Ed. Jaunvalks, prezidento de Riga E-klubo,  
E. Lippe, sekretariino de la klubo.

===== INFORMOJ \* ANONCOJ \* PETOJ \* SCIIGOJ =====

**BARNAUL**

Ce la E-klubo funkcias koresponda kurso, en kiu studas 20 personej, precipe el la Altaja reg. La kurso bazas sin sur la lernolibro de B. Kolker kaj estas estrata de V. Poljakov: 656038 Barناول-38, ab. kesto 178.

\* \* \* \* \*

**JURJEVEC**

En la urbo Jurjevec (Ivanova reg.) pasis "Semajno de juna lekto", kio estis bona okazo prelegi pri E. Rezulte de la prelegoj en la agrikultura teknikumo surbaze de la Klubo de internacia amikeco aperis filio de Ivanova E-klubo. La unuan lecionon vizitis 25 pers.

\* \* \* \* \*

**MIASS**

En la urbo funkcias 6 elementaj E-rondetoj: en kulturpalaco, mezlernejoj N<sup>o</sup>1, N<sup>o</sup>30, pedagogia lernejo, muziklernejo kaj uzino. La rondetojn gvidas membroj de Miassa E-klubo.

\* \* \* \* \*

**KOREKTO**

En la decembra numero de "A" (N<sup>o</sup>12, p. 166) sub la artikolo "Ertoj de sperto" ne estas metita la nomo de la aŭtoro V. Cernov (Kaluga). La Redakcio petas pardonon pro la domaga preterlaso.

\* \* \* \* \*

Estas daŭrigata konkurso je projekte de SEJM-insigno. Veku vian inventemon kaj proponu viajn spritajn variantojn. La projektojn, korektore surpaperigitajn, sendu al la Redakcio de "Aktuale".

DEZIRAS KORESPONDI

1. 100 Esperanto amikoj deziras korespondi. Skribu al: Hobby-Club "Esperanto" ĉe P.U.P.I.K. "Ruck", Katowice, str. Gliwicka 142, Pollando.

2. 100 membroj de FEA dez. korespondi: E-Rondo de la ministkulturdomo KWB - Tuiów, Zgotzelec, str. Bohaterow ZWM Nr12, Pollando.

Kelkaj utilaj adresoj:

1. Pola Radio, Esperanto Redakcio, 00-950 Varsovio, P.K. 46, Pollando.
2. Bulgara klubo de Filatelistoj "Amika Rondo", Sekcio BEA, Sofio, p.k. 5, Bulgario.
3. Danubkurbiĝo Esperanto grupo, 2600 Vao, Urba Kulturdomo, Hungario.  
S. Neillando, estrino de la Koresponda fk.

1. Pollando:

1. Zemon Pawlowski (26 j.) - 85-959 BIDGOSZCZ, 2, skritka pocztowa, 3 (pri PM, fotografio, turismo).
2. Bogdaw Stasiak (22 j.) - str. "Bohaterow Warszawy" 55/1124, 71-070 SZCZECIN (studento de ekonomio; pri moderna muziko, fotografio, sporto).

Bulgario:

3. Zdravka Dobрева (26 j.) - SOFIO, str. "Boris", 140.

Rumanio:

4. studentoj de filologio - Camin Studentesc, str. "Arini", 1, SUCEAVA, 6, (pri E-vivo, propagando de E-o): a) Crisanta Santu; b) Chetraru Adrian; c) Boiciuc Cheorbhe; d) Simion Brelenic; e) Lupu Mariana; f) Meta Marian kaj aliaj.

D. Gibulevskij (Ĥarkov).

Hungario

Deziras korespondi kolektive kaj individue membroj de "Amikeco" Esperanto-Grupo Bercsényi M.-út 52. - "Pionirdomo" H-5100 Jászberény, Hungario:

1. Erika Béta	1958	lernantino	5100.	Jászberény Lagzi u.22.
2. Erika Acs	1955	komercistino	5100.	Jászberény Klarka György u. 10.
3. Margaréta Tóbi	1958	lernantino	5100.	Jászberény Kun u. 9.
4. Elizabeta Benke	1954	komercistino	5100.	Jászberény Szövetkezet u. 6.
5. Gabriela Fehér	1958	laboristino	5100.	Jászberény Karpát u.12.
6. Helena Molnár	1958	komercistino	5100.	Jászberény Dinamit tér 29
7. Magdalona Molnár	1957	peltistino	5100.	Jászberény Vásár tér 8.
8. Eva Debos	1958	komercistino	5100.	Jászberény Nádor u.2. fsz. 17.
9. Johano Biró	1955	komercisto	5100.	Jászberény Fenyő u. 20.
10. Tiboro Biró	1961	lernanto	5100.	Jászberény Fenyő u. 20.
11. Johano Járomi	1956	komercisto	5100.	Jászberény Kun u. 11;
12. Stefano Fülöp	1957	komercisto	5100.	Jászberény Fenyő u. 20.
13. Stefano Ezsiás	1956	komercisto	5100.	Jászberény Kossuth ut 15.
14. Karlo Heroeg	1959	kuiristo	5100.	Jászberény Elefánti té 1.
15. Tiboro Sebék	1956	lignaĵisto	5100.	Jászberény Szövetkezet u. 14. 1. em.
16. Antonio Farkas	1954	veldisto	5100.	Jászberény Deák F.u.4.
17. Zoltano Vass	1950	seruristo	5141.	Jásztelek Bocskai u. 1.
18. Georgo Molnár	1955	kontrolisto	5141.	Jásztelek Szabadság ut 164.
19. Tiboro Sass	1956	ternisto	51	Jászboldogháza Dézsa u.2.

L. Gindin (Barnaul).



INFORMA FOLIETO DE LA SCIENC-TEKNIKA FAKO DE SEJM

N<sup>o</sup> 5

Januaro 1976

Taskej de "Scienc-Teknika folieto"

1. Aperigo de problemaj artikoloj.
2. Disputoj.
3. Terminologia laboro.
4. Intersanĝo de sperto.
5. Sciigoj de laŭfakaj sekcioj.
6. Bibliografioj.
7. Represo de interesaj materialoj el internaciaj E-gazetoj.
8. Anoncoj.

La provizora redaktoro de la "ST-folieto" k-de Genčarov etendas artikolojn, sciigojn, anoncojn. Skribu, gekomeradoj, pri viaj laboro, ideoj, pensoj, duboj.

PENSOJ POR LABORO DE LA SCIENC-TEKNIKA FAKO

Pluraj E-istoj sciencistoj krom konsento labori en kadro de la Scienc-Teknika fako (STF) komunikas kelkajn ideojn por laboro de la fako.

Lebedev V. - instruisto pri matematiko (Gusj-Ĥrustalnij): "Ĝuste tra la scienco (kvankam tia vojo estas pli malfacila) Esperanto venos al la vasta publike... Ni devas nepre havi informan bultenon de STF por scii, kiu kion faras, serĉas, proponas ktp."

Mišenko V. - inĝeniero fizikisto (Kievo): "STF devas: 1) unuigi ĉiujn E-istojn sciencistojn, dezirantajn aktivi en la E-faka laboro; 2) kompili fakajn terminarojn. Artikoloj, referaĵoj, sciencaj prelegoj utilas per eveluigi terminarojn; 3) formi laŭfakajn sekciojn; 4) en kelkaj urboj, kie la kvanto de sciencistoj-esperantistoj estas sufiĉe granda, formi lokajn grupojn."

Leanest L. - kand. de biolog. sc. (Estonio): "1) Unuopaj geesperantistoj ne povas vaste uzadi E-n en la scienco, do la fako bezonas sufiĉe da administraj rajtoj; 2) la fako faciligu ricevon de alilanda scienca literaturo en E kaj havigon de fakaj terminaroj."

Galinker V. - kand. de kem. sc. (Kievo): "1) Provizi Bibliotekon de Lenin kaj la Fremdlingvan (Moskvo) per plensaj jar kolektoj de "Sciencs Revuo" ("SR"); 2) organizi venon de "SR" al VINITI; 3) ellabori fakajn terminarojn; 4) en BET pridiskuti la demandojn "Esperanto en la scienco".

Flaks S. - sciencisto pri hidrometalurgio de metalej (Doneck): "1) Organizi eblecon intersanĝi opiniojn kun sciencistoj el aliaj landoj; 2) ĉiel spogi "SR" abone kaj per dispenigo de sciencaj artikoloj; 3) kiel estonta celo - fondi E-an sciencajn revuen de nia lando."

Zisman A. - fizikisto (Moskvo): "STF povas: 1) organizi kreajn grupojn per verki E-fakvertaĵojn; 2) fondi scienc-teknikan redakcion, kiu kontrolu materialojn sendotajn per publikigo; 3) per STF la enoj pagu kotizon 1-2rb. jare."

Dagis I. - prof. de plantfiziologio (Vilnius): "1) Estas dezirinde eldoni scienc-teknikan E-revuen en Sovetio, per tio: fondi iun sekcion de ISAN en Sovetio aŭ tute memstaran societon de esperantistoj-naturamikoj kun rajto eldoni sian organon; 2) per fondi societon de esperantistoj sciencistoj, organizi konferencojn de aktivuloj."

Genčarov A. - kand. de kem. sc. (Barnaul): "Ĝis aŭtuno 1976 kompili planon de laboro por la proksimaj jaro kaj jarkvine. Al la fino de la jarkvino antaŭvidi oficialan pledan elpaŝon en la Prezidio de Akademio de Sciencoj."

## KRONIKO

Ĝis la 10.1.76 estas kolektitaj adresej de 89 sciencistoj kaj kunlaboremaj inĝenieroj, posedantaj Esperanton en diversa grado. Kvankam de multaj dume ne venis responde pri la deziro partopreni la laboron de la ST-fako, estas interese scii la laŭfakan distribuon de niaj eventualaj fortoj: kemio - 10 personoj, medicino - 10, filologio - 9, fiziko - 9, matematiko - 8, metalurgio - 5, geografio - 5, elektrotekniko - 4, biologio - 4, ekonomio - 3, konstruado - 3, juro - 3, zoologio - 3, historio - 2, radiotekniko - 2, agrikulturo - 2, kaj po unu persono de la fakoj: mekaniko, desegna geometrio, muzikologio, psikologio, oceanologio, geologio, botaniko, aŭtekenstruado. Pri kelkaj kamaradoj mankas donitaĵoj.

Estas evidente, ke la listo de de sciencistoj per Sovetunio estas tute ne komplete. Pluraj urboj (ekz., Moskvo, Riga, Taskent k.a.) ankoraŭ ne sciigis pri siaj sciencistoj-esperantistoj. Gekamaradoj, helpu kompletigi la liston.

## NIA LABORO

## BIBLIOGRAFIO

En la soveta preso foj-foje aperadas sciigoj aŭ mencioj, kiuj povus esti utilaj en la laboro de la ST-fako kaj eĉ pli ofte en la laboro de la kreiganta propaganda sekcio de la ST-fako. Tiuj povas esti laŭ temoj: scienco kaj multlingveco, sciencaj konferencoj kaj multlingveco, scienc-teknika informado kaj lingvaj baroj, termin-kreado, terminara problemo, traduko de sciencaj tekstoj, eldiroj de famaj sciencistoj pri lingvaj baroj, sciencistoj pri Esperanto... K.s.

Ĉiujn menciejn necesas noti kaj sendi al k-de Genĉarev: latitekon de la gazeto aŭ libro, la daton kaj lokon de la eldono, paĝon, tekston de la citaĵo (se ĝi ne estas tre longa). Se eblas, sendu ankaŭ eltranĉaĵojn. Estas bonevena kaj konvena ankaŭ fakta materialo, kiun vi observas en scienco ĉirkaŭ vi.

La bibliografion ni aperigos sur la paĝoj de la "Scienc-Teknika folieto".

## BIBLIOTEKO

Ekde nun ni komencas kolekti bibliotekon de la ST-fako. Se iu havas oblaajn ekzemplerojn de scienc-teknikaj libroj aŭ terminaroj aŭ alifarmaj scienc-teknikaj E-tekstoj, bonvenu sendi al k-de Genĉarev. La previzora loko de la biblioteko - Barnaul.

## SCIIGOJ

\*-----\*

Venis informo de B.V.Tokarev el Moskvo, pruvanta, ke ĉiuj kemiaj artikoloj en la "Scienca Revuo" estas referataj en usona refero-revuo "Chemical Abstracts". Ekz., estas referitaj tie ĉiuj artikoloj de k-dej Tokarev kaj Genĉarev, aperintaj en la "Scienca Revuo".

## DIVERSAĴOJ

\*-----\*

Demando al la ST-fako:

Ĉu necesas anigi al la ST-fako ĉiujn inĝenierojn? (A.Kogan, Tiflino)

Responde:

La ST-fako strebas unuigi ĉiujn sciencistojn-esperantistojn kaj nur tiujn esperantistojn kun supera klerigo aŭ meza teknika, kiuj volas: a) labori en organiza sfero de la fako, aŭ b) labori pri E-terminologio, aŭ c) uzi Esperanton per faka teknika informado internacie.

KAMPANJO "INSTANCOJ"

La lasta SEJM-konferenco konsideris la rezultojn de la kampanjo "Eldonejoj" kontentigaj kaj alvokis la klubojn, kiuj ĝis nun partoprenis ne plene, skribi al la restintaj instancoj. Samtempe ĝi lanĉas novan kampanjon "Instancoj".

Ciuj klube kaj subtenante de SEJM estas petata ĉiusemajne sendi leterojn al unu-du instancoj el la suba listo laŭ ajna ordo krom la sinsekva. El la sube citita temaro zorge elektu temojn, evitante starigi demandojn, pri kiuj la koncerna instanco ne kompetentas.

SEJM-reprezentantoj kolektu ĉiujn respondejn kaj venigu al SEJM-Konferenco. Aparte interesajn respondejn bonvolu tuj komuniki al la SEJM-prezidanto Viktoro Areloviĉ aŭ al la komisiito pri specialaj taskoj Boris Kolker. La partopreno en la kampanjo estas poentata.

La leteroj estu laŭeble seriozaj kaj ĝentilaj, bone argumentitaj; el ili estu videblaj fideleco al la idealoj de nia ŝtato, amaseco kaj populareco de nia movado. Oni substreku, ke la celoj de la E-movado koincidas kun la politiko de la internacia malstreĉiĝo. La leteroj estu skribitaj de laŭeble diversaj personoj (eĉ komencantoj) kaj ne tre simlu unu al la alia.

## L i s t e d e i n s t a n c o j

1. Inturist - 103009 Moskva, pr. Marksa, 16.
2. Vsesojuznij centr perevodov - 117218 Moskva, Krjijanovskogo, 14, korpus 1.
3. Ministerstvo viŝŝego i srednego specialnogo obrazovanija SSSR - 103031 Moskva, Jdanova, 11.
4. Ministerstvo visŝego i srednego specialnogo obrazovanija RSFSR - 117049 Moskva, Leninskij pr., 6. (Ne-RSFSR-anoj skribu al siaj respublikaj ministerioj).
5. Ministerstvo prosveŝĉenija SSSR - 113162 Moskva, Ŝablovka, 49.
6. Ministerstvo prosveŝĉenija RSFSR - 103069 Moskva, Ĉistoprudnij bulvar, 6? (Ne-RSFSR-anoj skribu al siaj respublikaj ministerioj.)
7. Komitet zaŝĉiti mira - 119034 Moskva, Kropetkinskaja, 10.
8. Vsesojuznoje obŝĉestvo "Znanie" - 101000 Moskva, pr. Serova 4.
9. Bjuro mejdunarednogo molodjojnogo turizma "Sputnik" - 121019 Moskva, Lebjajij per., 4.
10. VCSPS - 117119 Moskva, Leninskij pr., 42.
11. Biblioteka im. Lenina - 121019 Moskva, pr. Kalinina, 3.
12. Agentstvo peĉati "Novosti" - 103009 Moskva, Puŝkinskaja pl., 2.
13. Izdatelstvo "Planeta" - 103001 Moskva, B. Sadovaja, 3.
14. Redakcija gazeti "Moskovskie novosti" - Moskva K-9, Gorjkogo, 16.
15. Redakcija gazeti "Trud" - 103792 Moskva K-50, Gorjkogo, 18.
16. Redakcija ĵurnala "Molodoj kommunist" - 101503 GSP Moskva K-30, Suŝĉevskaja, 21.
17. Redakcija ĵurnala "Ogonjok" - 125015 Moskva, Bumajnij pr., 14.
18. Redakcija ĵurnala "Selskaja molodjoj" - 103030 Moskva, Suŝĉevskaja, 21.
19. Redakcija ĵurnala "Filatekija SSSR" - 107140 Moskva, Davidovskij per., 6.
20. Centralnoje televidenije - 127000 Moskva, Ak. Koroljova, 12.
21. Redakcija gazeti "Sovetskij sport" - 101913 Moskva GSP, Moskva K-62, Arĥipeva, 8.
22. Mejdunarednaja kniga - 121200 Moskva, Smolenskaja-Sennaja pl., 32/34.

Proksimuma temaro  
por skribi leterojn laŭ la kampanjo "Instancej"  
(elektu laŭ la kompetenteco de la instanco)

- Publikigi:

- E-lernolibron
- E-vortarojn
- artikolojn pri E-movado
- turismajn prospektojn en E-o
- scienc-popularajn kaj sciencajn librojn en E-o
- selektojn de bildkartoj (pri urboj ktp)
- artikolon pri E-o kaj filatelio
- E-rusan frazlibron
- politikajn broŝurojn en E-o
- materialejn de la 25-a kongreso de KPSU en E-o
- beletrajn librojn en E-o
- Organizi turistajn grupojn al eksterlandaj aranĝoj
- Verki kaj konfirmi programon por fakultativa kaj rondeta instruado de Esperanto
- Uzi E-on en pacmovado konekse al la kontrakto inter Tutmonda Paŝ-  
onsilantaro kaj Mondpaca E-ista movado
- Eldoni informan broŝuron pri la Internacia lingvo uzebla per pre-  
legej
- Uzi E-on por internaciaj kontaktoj de sindikatoj, vaste instrui E-  
on en sindikataj kulturdemoj
- Ekuzi E-on lige kun la Olimpikaj ludoj en Moskvo
- Akiradi grandkvante kaj vendadi E-literaturon el socialismaj land-  
oj
- Akiradi por bibliotekoj E-an literaturon
- Organizi televidan elsendon pri E-o